

INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro
Rio de Janeiro - RJ — CEP.: 20031-921 - tel/fax.: (21) 2220-7486
retpoŝta adreso: esperanto.kke@gmail.com; ttt-paĝo: www.kke.org.br

Nº 54**9^a JARO (NOVA FAZO)****JANUARO-FEBRUARO / 2010****KAMPANJO ‘ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN’**

Laŭ propono kaj subteno de s-ano **FERNANDO MAIA JR.**, KKE sendis al la biblioteko de “L’*école L’Odysée*”, en la kanada urbo Moncton, libro-pakaĵon entenantan dek tri librojn en Esperanto. Sur la foto aperas s-ano **JEAN CODJIO**, la instruisto, kun kelkaj gelernantoj de la E-kurso.

Eventos

Nov, 4 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Nov, 6 – Palestra de Luiz Carlos Taveira sobre o tema “Gibran Khalil Gibran: Filósofo dos Profetas e Profeta dos Filósofos”, com a presença de 11 pessoas.

Nov, 09 – Roda Literária / Prosa em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Nov, 11 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Nov, 13 – Palestra de Paulo Sérgio Viana sobre o tema *Kiel diri...*, com a presença de 14 pessoas.

Nov, 16 – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Nov, 18 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Nov, 23 – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Nov, 25 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Nov, 27 – Festa dos Aniversariantes, com a participação especial do Coral do Printempo E-Grupo, com a presença de 25 pessoas.

Nov, 30 – Roda Literária / Poesia em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Dez, 4 – Palestra de Aloísio Sartorato sobre o tema *Rememoroj pri 46 Jaroj da Esperantista Vivo*, com a presença de 10 pessoas.

Dez, 7 – Roda Literária / Prosa em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Dez, 11 – Palestra em esperanto de Affonso Soares sobre o tema *Zamenhof – 150-jara Datreveno de Naskiĝo*, com a presença de 12 pessoas.

Dez, 14 – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato

Dez, 19 – Festa de Zamenhof / Festa dos Aniversariantes, com a participação especial de Neide Barros Rêgo e com a presença de 43 pessoas.

Doações para a Caixa Geral

Aylton Lima da Rocha: R\$ 10.000,00; Almir Ferreira: R\$ 1.000,00; Givanildo Ramos Costa: R\$ 20,00; Neide Barros Rego: R\$ 10,00. *Koran dankon al ĉiuj!!!*

Doações para a campanha Esperanto nas Bibliotecas

Zózimo Pereira Costa: R\$ 180,00; Fernando Maia Jr.: 120,00. *Dankon!!!*

Novos Associados

1728. Calissa Rosa Sartorato; 1729. Yan Lopes Curvello. *Estu ĉiuj bonvenaj!*

Remessas por conta da Campanha Esperanto nas Bibliotecas

68. Biblioteca Comunitária Tobias Barreto, Brás de Pina, Rio de Janeiro; 69. Biblioteca Pública Municipal Abdias Neves, Teresina, PI; 70. Biblioteca do C.E. União Fraternal da Universidade Federal de Alfenas, Poço de Caldas, MG; 71. Biblioteca Popular Municipal Pedro Nava, Glória, RJ; 72. Biblioteca do Educandário Espírita Eurípedes Barsanulfo, Goiânia, GO; 73. Biblioteca Popular Municipal da Tijuca Marques Rebelo, RJ; 74. Biblioteca Pública do Estado de Santa Catarina, Florianópolis, SC; 75. Biblioteca Municipal de Paraty, RJ.

Expediente

InKo, Boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 53, janeiro-fevereiro 2010.

Coordenação: Givanildo R. Costa, Presidente da KKE.

Redação e diagramação: Aloísio Sartorato

Revisão: Célio F. Martins

HELPO KAJ APOGO AL HAITIAJ SAMIDEANINO KAJ E-MOVADO

Sciante pri la terura tertremo okazinta en Haitio, kiu ŝokis la tutan mondon, mi memoris, ke en tiu lando estas esperantistoj, specife J. CHRISTINE THÉANNO, kiu loĝas en la ĉefurbo Port-au-Prince.

Ŝi, kiun mi konis en la 87-a Universala Kongreso de Esperanto, en Fortaleza, Ceará, en la jaro 2002, kaj estis intervjuita de mi por la radiprogramo “Esperanto, la Lingvo de Frateco”, pri kiu mi skribis pasinnumere de INKO, estis la tiama ĉefdelegito de UEA por Haitio.

Kompreneble mi supozis, ke ŝi kaj ŝiaj familianoj suferis ian tertreman konsekvencon, konsiderante, ke tie forpasis pli ol cent miloj da homoj. Do preskaŭ tuj mi klopodis havigi al ŝi helpon kaj apogon de ni, brazilanoj, kaj de eksterlandaj esperantistoj.

Pensante pri la seriozeco de tiu afliktega situacio, mi retkomputile kontaktis s-anon Renato Corsetti, el Italio, homo tre trafa kaj bonkora, kaj tiama prezidanto de UEA en la oficperiodo de CHRISTINE, kaj li rapide kontaktis aliajn esperantistojn, inter ili Rubén Torres, el Kolombio, kiu sukcesis kontakti ŝin.

La rezulto de tiu esplora serĉado estis, ke ŝi vivas, sed bedaŭrinde kelkaj el ŝiaj familianoj kaj geamikoj spertis plurajn teruraĵojn kaj la familiaj posedaĵoj estis detruitaj, laŭ retmesaĝo sendita de ŝi, kiun ni transskribas ĉi-sube:

“Saluton Rubén, dankon pro via amikeco. Mi bone fartas, sed ne tute mia familio. Mi perdis mian fraton kaj kelkajn aliajn membrojn de mia familio. En mia domo la muroj falis kaj nun ni dormas ekstere sur la stratoj kaj ni timas eniri en la domojn, kies strukturo estas malbona. La Fakultato de Lingvistiko, kie loĝis nia centro falis kaj ni perdis ĉiujn librojn kaj materialojn. Ĉiuj studentoj de la fakultato mortis ankaŭ (ili ne estis esperantistoj). Denove mi vin dankas pro via amikeco. Amikeme via, Christine.”

Do kian kompatindan vivalfronton ŝi havas. Surbaze de tiu okazintaĵo UEA kaj la monda esperantista komunumo kuniĝas por helpi ŝin kaj la haitian movadon. Se vi volas helpi Christine rekonstrui ŝian domon, bv. sendi financan subtenon al UEA kun la indiko “Espero-Haitio”. Tamen se vi volas doni ĝeneralan helpon al la haitia movado por rekonstrui ilian kunvenejon, restarigi ilian bibliotekon aŭ por sendi reprezentanton al UK en Havano, sendu vian kontribuon al UEA kun la indiko “Amerika Komisiono-Haitio”.

Ĉi-okaze mi volas esprimi mian dankon al Renato Corsetti, Rubén Torres, Martin Šaeffer kaj aliaj samidenoj de la tuta mondo, kiuj helpis kaj helpos tiujn suferigajn ulojn.

Iru antaŭen Christine! Dio benu vin!

Givanildo Ramos Costa

Zamenhof – 150-jara Datreveno de Naskiĝo

Affonso Soares

Estimataj Gesamideanoj,

Ni hodiaŭ omaĝas la iniciatoron de la Neŭtrala Internacia Lingvo, D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Li naskiĝis antaŭ ĝuste 150 jaroj, la 15-an de Decembro 1859, en la pola urbeto Bialystok, kiam Pollando estis aneksita al la Rusa Imperio. Aliaj du grandaj imperioj ĝin landlime tute ĉirkaŭis, nome la Imperioj Germana kaj la Aŭstro-Hungara.

La kunvivado de la loĝantoj de lia urbo decide rolis en la direkto de la vivo de Zamenhof ekde lia plej frua infaneco.

En Bialystok, kvar etnoj neamike interrilatis, dividitaj laŭ siaj moroj, lingvoj, aktivecoj kaj religioj — ili estis rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj.

La rusoj, kiel superregantoj, ekspluatis tiun dividon por pli facile subigi la aliajn grupojn, surbaze de tiu makiavela principo — *divide ut regnes* — dividu, por ke vi superregu.

La hebreoj praktikadis la komercon, la metioj estis en la manoj de la germanoj, la rusoj trudis al ĉiuj sian kulturon, sian lingvon, sian opreson, la poloj, flamigitaj de naciisma sento, estis katolikoj, protestantoj estis la germanoj, la rusoj havis ortodoksan konfesio.

Sed la plej frapanta diferenco montriĝis, precipe al la infano Zamenhof, en la lingvodiverseco, kiu ankoraŭ pli akcentis la dividiĝon.

Tiu diferenco postlasis profundan, neforviŝeblan postsignon en la sentema animo de la infano.

Por la malgranda Zamenhof, la lingvo estis la plej grava kaŭzo de interhoma apartiĝo.

Ankoraŭ en la aĝo de 6 jaroj, li revis havigi al la homaro ian komunan, internacian lingvon, per kiu ĉiuj povus interkompreniĝi kaj sekve frate unuiĝi.

La infanaj ideoj memkompreneble cedis lokon al moral-intelekta maturiĝo, sed la revo pri ia neŭtrala internacia lingvo ĉiam viglis en lia koro kaj realiĝis kiel Esperanto.

Al tiu idealo Zamenhof oferis tempon, monon, komforton, sanon — unuvorte, sian vivon.

La prilingvaj inklinoj de Zamenhof montriĝis jam en la infanaj jaroj.

Kvankam ĝi estis la lingvo de la superregantoj, Zamenhof amegis la rusan idiomon. Li revis iam fariĝi grava literatoro en la rusa, kaj ankoraŭ kiel infano li verkis poemojn kaj eĉ

kvinaktan teatraĵon en ĝi.

Sed li elreviĝis, ĉar lia amo al la lingvo estis pagita per malamo kaj malŝato al lia gento.

Tiu sento, plifortigita de la konfliktoj inter la ceteraj grupoj en Bialystok, ankoraŭ pli intensigis lian aspiron al la paco inter ĉiuj landoj, al libereco de ties loĝantoj, al respekto inter ĉiuj, al justeco kaj frateco inter ĉiuj popoloj.

De tiam ĝis la finkonstruo de Esperanto, Zamenhof iris vere evoluan vojon.

En la gimnazio, li nutradis la esperon revivigi unu el la antikvaj lingvoj por komuna uzado. Li decidiĝis por latino, sed tuj forlasis la ideon, ĉefe pro la ekstrema malfacileco de ĝia lernado.

Li tiam elpaŝis al konstruo de tute artefarita lingvo, ia lingvo tiel nomata apriora, kies elementojn li mem kreus: vortojn, deklinaciojn, konjugaciojn. Sed li ankaŭ tuj rezignis sian intencon.

Liaj vastaj scioj pri la rusa, la pola, la germana, krom ankaŭ tio, ke li bone legis en la franca kaj havis teoriajn sciojn pri aliaj 8 lingvoj, estigis ĉe li la komprenon, ke por la ellaborado de ia internacia lingvo oni ne povus ignori la riĉegan lingvan materialon elvolvitan de la homaro laŭlonge de la jarcentoj.

Sed estis la lernado de la simpla gramatiko de la angla, kiu lin decidigis al konstruo de iu lingvo kun maksimume simpla gramatiko. Estus forĵetata ĉio superflua, kiel ekzemple la komplikitaj deklinacioj kaj konjugacioj.

Sed ankoraŭ mankis la venko super tiu timeginda obstaklo, nome la leksikono, kies konsterna amplekso evidentiĝis en la enormaj, dikegaj, nacilingvaj vortaroj.

Unu tagon, du vortoj vekas lian atenton dum li promenadis: svejcarskaja (pordistejo) kaj konditorskaja (sukeraĵejo). La komuna finaĵo montris al li la rimedon por malgrandigi la vortarojn. Subite venis al li en la kapon la ideo doti la lingvon per ia regula sistemo de afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj), per kiuj malaperus multego da memstaraj vortradikoj. Sufiĉus aldoni afikson al la fundamenta radiko kaj la novaj vortoj nature formiĝus.

Ne necesus, ekzemple, listigi la antonimojn. La prefikso MAL, aldonita al la radiko, formus la kontraŭan ideon. Do la portugala MAU naskiĝus el la antaŭmeto de la prefikso MAL al la vorto BONA. AMO=Amor, MALAMO=Ódio

En 1878, kiam Zamenhof estis nur 19-jara, 9 jarojn antaŭ la lanĉo de Esperanto, jam ekzistis primitiva formo de la lingvo.

Plej signifoplena estis tio, ke la animo, kiun Zamenhof enblovis en la lingvon — kiu animo neniam ĝin forlasis — jam montriĝis en la pensoj esprimitaj en tiu primitiva formo.

Kunveninte en la 5-a de Decembro 1878, Zamenhof kaj iuj liaj gimnaziaj kolegoj, kiuj aliĝis al la nova lingvo, kantis la himnon al la nova idealo, kiu jene tekstis en tiu primitiva Esperanto:

Malamikete de las nacjes,
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

Malamikeco de la nacioj,
Falu, falu, jam tempo estas!
La tuta homaro en familio
Unuiĝi devas



Ĝis li lanĉis Esperanton, la 26-an de Julio 1887, en ties definitiva formo, Zamenhof eksperimentis ĉiamaniere sian lingvon, ĉefe per ties praktikado, kun la celo havigi al ĝi propran spiriton, tio estas, evitante, ke Esperanto montriĝus kiel nura ombro de iu ajn lingvo.

Fine, kiel frukto de lia genieco, de lia talento, de lia pacienco, persistemo, fido, kuraĝo, inter aliaj virtoj, ekaperas la idiomo.

La 1^a Libro enhavis longan antaŭparolon kun profunda analizo de la lingvo kaj de la problemoj, kiuj ĝi solvos, krom ankaŭ la gramatiko kun nur 16 senesceptaj reguloj, vortaro kun 917 radikoj, el kiuj, per la sistemo de afiksoj, formiĝos 10.000 memstaraj vortoj, kaj iuj specimenaĵoj: la Patro Nia, pecoj el la Genezo, modelo de letero, 2 originalaj poemoj (Mia Penso kaj Ho, mia kor'!) kaj poemo tradukita el Heine.

Post ili venis la 2^a Libro, unu Suplemento, vortaroj kaj tradukoj.

Lia originala verkaro, konsistanta el antaŭparolo, artikoloj, traktatoj, paroladoj, leteroj kaj poemoj, fariĝis vera monumento, kiel modelo por la bona uzado de la lingvo, kiel sekura orientado al tiuj dezirantaj disvastigi la lingvon, kaj kiel fonto de morala edifado por la homaj interrilatoj.

Estas mireginde, ke, en 30 jaroj — 1887 ĝis 1917 — Zamenhof tre multe produktis, ĉar lia tempo estis dividita inter la zorgoj pri la lingvo, pri ties movado kaj la afliktaj zorgoj pri la propra vivo, ĉiam konstante kaj profunde trafata de ĉiaspecaj malfacilaĵoj, ĉefe tiuj ligitaj al sano kaj mono.

Unu el la plej signifoplenaj trajtoj de lia bela karaktero estis, laŭ Gaston Waringhien en sia verko 1887 kaj la Sekvoj..., prudento kaj toleremo en la trakto de tiuj demandoj rilataj al la uzado de la lingvo.

Zamenhof neniam agis malcedeme, ekskluziveme, ordoneme. Li timis ĉion ekscese precizan, rigore ekzaktan kaj logikan.

Estas unu lia verko — Lingvaj Respondoj — en kiu, ĉe ĉiu paŝo, legiĝas esprimoj klare vidigantaj tiujn liajn trajtojn:

Nur la uzo iom post iom ellaboros definitivajn regulojn — Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj — Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur

katenus — En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi?

Sed Waringhien prave observas, ke tiu toleremo, certiganta la evoluon de la lingvo, estis ebla, ĉar la bazoj de Esperanto estis solide protektataj kontraŭ ĉia ŝanceliĝo.

Por starigi tiun bazon, Zamenhof havigis karakteron de netuŝebleco al tri verkoj:

- Plena Gramatiko
- Ekzercaro
- Universala Vortaro

Ili donas konsiston al la tiel nomata FUNDAMENTO DE ESPERANTO.

La kreskado kaj disvolviĝado de iu lingvo dependas de ia inerciforto, kiu konservu al la elementoj de tiu lingvo senŝanĝon kaj stabilecon, neprajn kondiĉojn por interkompreniĝado.

En la naciaj lingvoj, tiu inerciforto fontas el la jarcenta tradicio. En Esperanto, ankoraŭ sen tia tradicio, ĝi sidas sur la karaktero de netuŝebleco de la FUNDAMENTO.

Waringhien asertas, ke la genieco de Zamenhoj evidentiĝas, interalie, ĉe tiu vera lingva tabuo — LA NETUŜEBLA FUNDAMENTO.

Ĝis 1905, la lingvo estis preskaŭ ekskluzive uzata en skribo.

Ankoraŭ ne estis do respondita la granda demando: ĉu Esperanto ja funkcias parole tiel bone kiel skribe?

Tre pozitiva respondo estis donita en la laboroj de la 1^a Universala Kongreso, okazinta en 1905 en la franca urbo Bulonjo-sur-Marco

La unuan fojon, diversnaciaj viroj kaj virinoj plene interkomunikiĝis per neŭtrala, komuna lingvo, super la lingvaj baroj, kiuj ilin disigis.

En sia malferma parolado, Zamenhof diris:

Ni konsciis bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

Brilas en tiuj vortoj la noblaj idealoj de alproksimigo de la homoj sur neŭtrala lingva fundamento.

Esperanto devus servi ne nur al celoj praktikaj, materialaj, komercaj. Ĝiaj idealoj estas pli altaj, idealoj de universala frateco, de interpopola justeco, elvokantaj en la homo ian aspekton de lia personeco ĝis tiam sufokatan de la naciismoj, de la sektismoj.

Esperanto celas — kaj nur ĝi povas tion atingi — vekti en la homo la senton de aparteneco al la homaro, al la homa familio.

De 1905 ĝis 1912, en siaj malfermaj paroladoj en la Universalaj Kongresoj, Zamenhof tuŝis diversajn temojn ligitajn al tiuj idealoj de esperantismo.

Religio paradokse montriĝas kiel unu el la faktoroj plej apartigantaj la homojn inter si.

Zamenhof do konceptas ian principaron, kiun li nomis Homaranismo, kun kies helpo povus formiĝi ia tereno, en kiu kunvivadus, frate kaj respekteme, anoj de diversaj religioj kaj liberpensuloj.

Ĝi estus, simile al Esperanto, ia Neŭtrala Religio Universala, kies praktikado ne disigus la homon de sia persona kredo.

Al la Kongreso de Rasoj, en 1911, li sendis Memuaron, en kiu li montris la reciprokan malkonfidon de lingvoj kaj religioj inter si kiel unu el la ĉefaj kaŭzoj de interrasa malamo.

La Unua Mondmilito, de 1914 ĝis 1918, ankaŭ elvokis liajn konsiderojn pri la kaŭzoj de la homaj konfliktoj, el kiuj — li diris — elstaras la superregado de popoloj super aliaj popoloj.

La solvo de tiu ankoraŭ daŭranta milito estus ia packontrakto, kiu certigus al ĉiuj grupoj, ene de la pluraj ŝtatoj, egalecon kaj liberecon, ebligantoj de frateco.

La granda misiulo de frateco kaj konkordo forlasis la mondon en la 14^a de Aprilo 1917, kun la koro rompita de la ŝajna ruiniĝo de ĉiuj liaj revoj, dispremegitaj de la mizeroj de tiu kolektiva konflikto.

Sed la Bialystokaj idealoj ne mortis kaj neniam mortos. Esperanto postvivis la du Mondmilitojn, postvivis la persekutojn regionajn kaj naciajn, kiujn kontraŭ ĝi iniciatis grupoj obskurantismaj, diktatoroj de totalismaj ŝtatoj kaj pseŭdosciencaj antaŭjuĝoj.

Nia plej granda omaĝo al ĝia kreinto estu do ne nur la uzado de tiu genia interkomunikilo, kiun li postlasis al la homaro. Ĝi estu multe pli ol ĉi tio! Ĝi estu la praktikado de la idealoj, kiuj formas la animon de tiu komunikilo. Tiuj idealoj brilas en la tiel nomata interna ideo, troviĝas en la bazo de la homaranisma doktrino. Per ilia praktikado la homaro iam eniros en la vere universalisman fazon de sia evoluado. Tiu fazo jam estas anticipite, ĉiujare travivata, ekde 1905, en Bulonjo-sur-Mar, okaze de la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Mi vin tre dankas!

Bibliografio:

Unuaj Libroj por Esperantistoj - Ludovikito
Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto - Marjorie Boulton
1887 kaj la sekvoj... - Gaston Waringhien
Elektitaj Paroladoj kaj Prelegoj - Ivo Lapenna
Originala Verkaro - L. L. Zamenhof
Enciklopedio de Esperanto – Hungara Esperanto-Asocio

La nova modo: -ujo

Anna Lowenstein

Kial mi insiste pludiras *Germanujo* kaj *Italujo*, kiam ĉiuj aliaj preferas *Germanio* kaj *Italio*? Nu, pro pluraj kialoj. Parte ĉar -io ŝajnas al mi stranga finaĵo, ne kongrua kun la simpleco kaj reguleco de Esperanto. Pli pri tio poste. Sed plejparte ĉar mi ne eltenas la konfuzon, kiun la finaĵo -io alportis al la landonoma sistemo en Esperanto.



Kia konfuzo? Hmm, kiel klarigi la landonoman sistemon en unu alineo? Mi jam dediĉis al tiu temo tutan libreton. Sed mi faros mian eblon klarigi rapide.

La landonomoj en Esperanto estas dividitaj en du grupoj. Unu grupo sekvas la modelon *Usono*, *usonano*, la alia sekvas la modelon *Britujo*, *brito*. Multaj esperantistoj, kompreneble, preferas uzi -io anstataŭ -ujo, kaj do diras *Britio*. La problemo estas, ke ankaŭ en la unua grupo (*Usono*, *usonano*), multaj landonomoj finiĝas per -io, ekzemple *Alĝerio*, *Aŭstralio*, *Namibio*, *Kolombio*. Do, kiam oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per -io, kiel scii, ĉu ĝi sekvas la modelon *Usono*, *usonano*, ĉu la modelon *Britio*, *brito*? Tio gravas, kiam necesas formi la nomon de la landano, ĉar en la unua kazo necesas aldoni -ano al la radikoj, dum en la dua necesas forigi la -i-.

Kiam la plejmulto da esperantistoj uzis la finaĵon -ujo por landonomoj de la dua grupo, ne estis problemo. Ĉiuj esperantistoj (eĉ tiuj, kiuj preferis -io) sciis, al kiu el la du grupoj landonomo apartenas, kaj do senprobleme sciis formi la nomon de la landano. Sed nun, bedaŭrinde, kiam preskaŭ ĉiuj uzas -io, la distingo inter tiuj du grupoj perdiĝis, tiel ke multaj esperantistoj ne plu komprenas kiel la sistemo funkcias; efektive iuj ne plu komprenas, ke entute ekzistas du-parta sistemo. Rezulte, oni tre ofte renkontas erarajn formojn, ekzemple *aŭstralo* aŭ *Israelio*. (Se vi ne komprenas, kial tiuj estas eraraj, bonvolu legi la pli detalan klarigon en mia libreto *Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto*.)

Sed krome, la finaĵo -io kunportas plurajn aliajn problemojn. Ĉu la -i- estas sufikso? Ĝi ne similas la aliajn sufiksojn en Esperanto, kiuj normale havas la formon V+K (vokalo plus konsonanto) aŭ V+KK. Krome, ĝi kondukas iom malsame: malkiel la aliaj sufiksoj oni ne povas uzi ĝin memstare.

La vortelementoj en Esperanto normale estas kunmetitaj laŭ trarivebla maniero. Ni ĉiam emfazas tiun faktan en nia reklamado: kiam ni volas konvinki la homojn lerni Esperanton, ni donas ekzemplojn kiel *mal-jun-ul-in-o* aŭ *nask-iĝ-tag-o*. Tiuj kunmetaĵoj estas facile analizeblaj kaj ĉiu elemento havas sence. Sed kion diri pri la -i- en *Francio*? Certe ne ekzemplo, kiun ni povus uzi en nia reklamado!

Mi foje aŭdas la kritikon, ke la sufikso -uj- havas tro da signifoj en Esperanto. Nu, ĝi ja havas tri malsamajn signifojn – kaj tamen, multe malpli ol -io, kiu kondukas vere ĥameleone en Esperanto. -io foje estas uzata:

por la nomo de scienco, ekzemple *astronomio* aŭ *biologio*, kontraste kun la nomo de la sciencisto *astronomo* aŭ *biologo*;

por la nomo de ĥemia elemento, ekzemple *ejnŝtejnio*, *mendelevio* surbaze de la personaj nomoj *Ejnŝtejno*, *Mendelevo*;

por la nomo de regosistemo, ekzemple *demokratio* aŭ *monarĥio*, kontraste kun la vortoj *demokrato* kaj *monarĥio*;
por diversaj aliaj ismoj kaj ecoj, ekzemple *stenografio*, *pederastio* kontraste kun la vortoj *stenografo* kaj *pederasto*;
kiel unu el la korelativoj;
(sen la fina -o) kiel infinitiva finaĵo de la verbo.

Mi scias, ke multaj esperantistoj ne ŝatas -ujo pro ĝia baza signifo kiel entenujo. Kaj do? Ĉu persona ŝato aŭ malŝato rilate al iu elemento en Esperanto donas la rajton modifi la lingvon – precipe kiam tiu modifo detruas la logikon de unu el ĝiaj sistemoj? Cetere, mi mem uzas -ujo multe pli ofte en landonomoj ol en vortoj kiaj *laktujo*, *sukerujo* ktp., do por mi tio estas ĝia ĉefa signifo.

Aliaj esperantistoj kontraŭstaras la finaĵon -ujo pro etnismaj kialoj. Ili argumentas, ekzemple, ke ilia lando ne nomiĝu *Hispanujo*, ĉar tie loĝas ne nur hispanoj, sed ankaŭ katalunoj, eŭskoj kaj aliaj. Laŭ ili, tiu problemo malaperas, se la lando nomiĝas *Hispanio*. Ĉu vere? Al mi tio ŝajnas nura ĵonglado per vortoj, pli precize per sufiksoj: provo solvi politikan problemon per manipulado de la lingvo. Farante tion, oni neniel ŝanĝas la situacion de la katalunoj kaj eŭskoj, sed oni ja terure fuŝas la regulecon de Esperanto.

Per la uzo de -i- oni forglitas de la facila analizebleco, kiu estas ĉefa trajto de Esperanto, al nedisigeblo simila al tiu, kiu regas en la nature evoluintaj lingvoj. Certe, iuj neregulaĵoj jam ekzistas en Esperanto: pensu pri la serioj *redakti*, *redaktoro*, *redakcio*, kaj *poeto*, *poemo*, *poezio*. Tiuj tri-vortaj serioj evidente havas komunan fonton, sed la elementoj ne povas esti disigitaj; efektive la lasta konsonanto de la radiko eĉ estas modifita. Tiuj ekzemploj, bonŝance, rilatas nur al unuopaj vortoj, kaj do ne havas sekvojn por la baza funkciado de Esperanto. La situacio estas multe pli serioza, kiam tia neanalizebleco trafas tutan sistemon, t.e. la sistemon formi la landonomojn.

Mi rimarkas kun plezuro, ke -ujo komencas iometete reapari. Interalie, unu el la estraranoj de UEA lastatempe ekuzis ĝin, konvinkite de la argumentoj en la libro *Rusoj loĝas en Rusujo*. Multaj esperantistoj efektive komprenas, ke -ujo estas pli logika ol -io, sed ili hezitas mem uzi ĝin, ĉar ili trovas ĝin “eksmoda”. Nu, modoj povas ŝanĝiĝi, ĉu ne?

Se vi opinias, ke -ujo estas pli bona ol -io, kuraĝu ekuzi ĝin! Estu en la fronto de la nova modo!

Por pli da informoj pri la finaĵo -ujo, vidu:

Rusoj loĝas en Rusujo: landonomoj en Esperanto. Corsetti, Gubbins, Wennergren, de Kock, Vaha, Butler, Camacho k.a. Federazione Esperantista Italiana, Milano, 2007. Prezo: €10.50 ĉe la libroservo de UEA.

La libro estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla ĉe:

http://www.bonalingvo.it/index.php/Rusoj_loĝas_en_Rusujo_Landonomoj_en_Esperanto .

Konciza klarigo pri la landonomoj en Esperanto: kun kompleta listo de landoj kaj landanoj. Anna Löwenstein. Palestrina, 2009. Prezo: €0,90 ĉe la libroservo de UEA.

La libro estas ankaŭ legebla kaj elŝutebla ĉe: <http://www.bonalingvo.it/docs/klarigoprilandonomoj.pdf>.

La landonomoj – pli simplaj ol vi supozas! 37-minuta parolado de Anna Löwenstein spektebla ĉe: <http://www.ipernity.com/doc/29075/5145769> kaj ĉe: <http://www.vimeo.com/5030540>.

A ESTRUTURA DA FRASE EM ESPERANTO

1 – **OS TRÊS ELEMENTOS PRINCIPAIS** – Como já dissemos em nosso livro “Esperanto Conversacional” (Curso Básico), na frase “O menino vê o leão”, temos três elementos importantes: o menino, o verbo (“vê”) e o leão. Como se sabe, nessa frase, o “menino” é o sujeito (ou seja, é o elemento que faz a ação indicada pelo verbo). E o “leão” é o objeto direto (ou seja, é o elemento que sofre a ação indicada pelo verbo). Em Português – em frases deste tipo – sabe-se que um elemento é o sujeito porque ele é colocado antes do verbo; e sabe-se que o outro elemento é o objeto direto porque ele é colocado depois do verbo. Note-se, porém, que nem todas as línguas (como algumas orientais) usam essa nossa ordem de colocação dos elementos na frase. Por isso, a fim de garantir a clareza do sentido para todos os povos, em Esperanto marca-se, com um “N” final, a palavra ou palavras que constituem o objeto direto da oração. Agora, passemos as frases acima para o Esperanto, lembrando-se de que, nele, marca-se o objeto direto com o “N” do acusativo. Ou seja: “La knabo vidas la leonon” – O menino vê o leão; – “La leono vidas la knabon” – O leão vê o menino. Isso significa, na prática, que em Português – em frases deste tipo – não se deve colocar o verbo no “fim” da frase, como, por exemplo: “O menino o leão vê”... Nesta última frase, a rigor, não se pode saber qual elemento é o sujeito, nem qual elemento é o objeto direto. Ou seja, nesta última frase, em Português, não se pode saber “quem vê”, nem “quem é visto”. Note-se, porém, que em Esperanto mesmo esta última frase (com o verbo no fim) poderia ser traduzida com a mesma estrutura. É que, em Esperanto, graças ao acusativo, até esse tipo de frase pode fazer sentido, bastando colocar o acusativo em um dos dois elementos. Ou seja: (1) “La knabo la leonon vidas” – O menino vê o leão; – (2) “La knabon la leono vidas” – O leão vê o menino; etc. Como se pode observar, ao traduzir estas frases cujos elementos estão fora da ordem “normal”, agimos da seguinte maneira: primeiro, traduzimos o elemento que não tem o “N (ou seja, o sujeito); depois, traduzimos o verbo; e, finalmente, traduzimos o elemento que tem o “N” (ou seja, o objeto direto).

2 – **COMPLEMENTOS PREPOSICIONADOS** – Logo após uma “oração básica”, como aquelas apresentadas acima, ou seja, com aqueles três elementos principais (sujeito – verbo – objeto direto), pode aparecer um “complemento preposicionado”, o qual serve, principalmente, para acrescentar à frase alguma “circunstância” (de lugar, de tempo, etc.). Ex.: “La knabo vidas la leonon en la parko” – O menino vê o leão no parque. Note-se que a estrutura frasal do Esperanto é bastante flexível, pois podemos dar vários “arranjos” diferentes a uma mesma frase, bastando mudar a colocação dos diversos “blocos” que a constituem. Exs.: (1) “La knabo vidas, en la parko, la leonon” – O menino vê, no parque, o leão; (2) “La leonon, en la parko, vidas la knabo” – O menino vê, no parque, o leão; (3) “La knabon, en la parko, la leono vidas” – O leão vê, no parque, o menino; etc. E, como também já sabemos, normalmente não se usa o acusativo após uma preposição – a não ser para indicar movimento em direção a um alvo. Ex.: “La knabo kuras en la parkon” – O menino corre para dentro do parque; etc.

3 – **ORAÇÕES INTERLIGADAS** – Como se sabe, “oração” é uma frase organizada em torno de um verbo, como ocorreu nos exemplos acima. Isso significa, na prática, que cada oração tem seu próprio verbo (ou locução verbal, por ex.: “La knabo volas vidi la leonon” – O menino quer ver o leão). Assim, naturalmente, uma frase (ou “período”) pode conter apenas uma oração (com apenas um verbo), mas também pode conter várias orações interligadas por meio de diversos “conectivos”, como são as “conjunções”, por exemplo, “sed” (= mas), “kiam” (= quando) – ou o chamado “pronome relativo”, ou seja, “kiu” (= que – no sentido de “o qual, a qual); etc. Ex.: “La knabo vidas la leonon en la parko, kiam lia patro permesas” – O menino vê o leão no parque, quando o seu pai permite; etc. Outro exemplo: “La knabo vidas, en la parko, la leonon, kiu estas en la kaĝo” – O menino vê, no parque, o leão que está na jaula; etc. Graças à grande “clareza” da gramática do Esperanto, a “estrutura” da frase, nele, fica como que “transparente”, permitindo que se faça, a qualquer momento, se necessário, uma espécie de análise sintática ou morfológica – e, embora o Esperanto exija muito mais o uso da “lógica” por parte do aluno, este, porém, como muitos reconhecem, acaba por compreender muito melhor até a sua própria língua nacional... Mais detalhes, no livro “La Konversacia Klubo”. Peça-o à nossa Cooperativa (www.kke.org.br).



Paulo Sérgio Viana prelegas pri *Kiel diri...*



Aloísio Sartorato prelegas pri *Rememoroj pri 46 jaroj da esperantista vivo*



Affonso Soares prelegas pri *Zamenhof - 150-Jara Datreveno de Naskiĝo*



Daniel Peliz lanĉas sian libron dum la Zamenhofa Festo 2009 en KKE



Neide Barros Rêgo deklamas dum la Zamenhofa Festo de KKE 2009



Dulcydides kaj Neide kantas, dum Te-rezinha pianludas